ADORU 871



2. Savanto de l' mondo, ni ŝuldas al Vi
eternan honoron pro Via ofer'.
Nun sondu kaŝitajn profundojn de l' kor'
kaj trovu juvelojn de fido kaj ver'.

3. Ho, kia miraklo de amo kaj grac',
ke Dio en Kristo suferis por ni!
Kun Li krucumitaj, liberaj de pek',
ni vivas eterne, gefiloj de Di'!

4. Jes, ni kun anĝeloj glor-kantas al Di',
la Patro amata, sindona Sinjor'.
Pro benoj sen-nombraj verŝataj sur nin
ni danke Lin laŭdas en sankta ador'.

GLORKANTAS ANĜELOJ • M (St. Denio): tradicia kimra, HON 242 • E (originale verkita): W. J. Downes 1969, sub inspiro de 2 Kro 29,30 • TK 32